



EŬROPA KAMPANJO POR INDUSTRIA KAJ TEKNIKA HEREDAĴO

Gazetaro Komunikado 1 - 26/05/2014

1.

La Industria Revolucio komencis en la 18-a kaj frua 19-a jarcento sur la eŭropa kontinento kaj disvastiĝis de tie tra ĉiuj kontinentoj. Estis la komenco de tutmonda ekonomio, en kiu teknikoj, materialoj, maŝinaro, kapitalo kaj sociaj sintenoj transpasis ĉiujn limojn.

Industria kaj teknika heredaĵo estas tut-eŭropa heredaĵo.

Tial necesas translima kunlaboro kaj interŝanĝo de scioj kaj informoj por studi, konservi kaj alirigi industrian kaj teknikan heredaĵon de malsamaj landoj kaj regionoj.

2.

Antaŭ kelkaj jaroj asocioj el diversaj eŭropaj landoj, kunigitaj en E-FAITH (Eŭropa Federacio de Asocioj de Industria kaj Teknika Heredaĵo) lanĉis la ideon dum unu jaro samtempe okazigi aktivecojn en laŭeble multaj landoj, kaj preni iniciatojn por elstarigi la valoron de ĉi tiu heredaĵo.

Tiu ideo estis reflektita en raporto de la Konsilio de Eŭropo¹: *"La Asembleo petas daŭran apogon de publika implikiĝo kaj volontula laboro kiu kreas konscion kaj aprezon de la valoro de la industria heredaĵo kaj kontribuas per desubaj iniciatoj por proponi por protekto, konservado kaj konverto al novaj uzoj milojn da industriaj heredaĵaj ejoj tra Eŭropo.*

Tiurilate, la Asembleo akceptas la kampanjon de la Eŭropa Federacio de Asocioj de Industria kaj Teknika Heredaĵo (E-FAITH) petante Eŭropan Jaron por Industria Heredaĵo en 2015"

3.

Dume, pli ol 150 asocioj kaj institucioj el 19 eŭropaj landoj, promesis sian subtenon al la iniciato, kaj en multaj lokoj volontuloj - sed ankaŭ publikaj instancoj - ellaboris projektojn kaj programojn por 2015. Tiu kampanjo, kiu originis kaj disvolviĝis de la bazo, malsupre-supren, malkiel aliaj eŭropaj kampanjoj kiuj supro-malsupren okazis.

Ĝi estas tial ekzemplo de civitanaj iniciatoj kaj de la forto de la asocioj. Ankaŭ estas testo kiu montros kiel la registaroj kaj instancoj en la diversaj landoj kaj regionoj, kuraĝigas, taksas kaj apogas la laboron de asocioj kaj volontuloj.

4.

Ekde la apero de intereso pri industria heredaĵo, ekde la mezo de 1960 en Britio, poste en aliaj landoj, ĉiam estis asocioj kaj volontuloj kiuj havis gvidan rolon. Sen ilia devontigo, multe da heredaĵo hodiaŭ estus nerehaveble perdita - kaj ankoraŭ nun perdiĝus multaj industriaj heredaĵoj.

2015, la Eŭropa Jaro de Industria kaj Teknika Heredaĵo tial estas omaĝo al la nepagita kaj neprofitema dediĉo de multaj homoj, klube aŭ individue.

¹ Committee on Culture, Science, Education and Media (Komitato pri Kulturo, Scienco, Edukado kaj Amaskomuniloj): **Industrial heritage in Europe. Raporto** (Doc. 13134, 15 februaro 2013. Raportanto : Ms ISMETA DERVOZ) - 8 Marto 2013. Tiu raporto elŝuteblas en la angla kaj franca lingvoj je la retpaĝo: <http://www.e-faith.org/home/?q=content/council-europe>

5.

La ĉefa objektivo de E-FAITH estas stimuli dum 2015 translimajn kontaktojn kaj kunlaboron inter asocioj kaj volontuloj. Kun ili ja sukcesos atingi pli, apogi reciprokajn penadojn kaj interŝanĝi ideojn, spertojn kaj kompetencojn.

2015 estu la komenco, unua paŝo kiu daŭros en la postaj jaroj.

Por tio E-FAITH unuavice agas tra du orientiĝoj:

5.1. E-FAITH instigas **fratiĝojn inter asocioj** de la sama tipo kaj okupiĝantaj pri simila industria heredaĵo. Temas pri asocioj el du malsamaj landoj kiuj renkontiĝas, ekkonas unu la alian kaj decidas reciproke kunlabori - kaj kies estraranoj kaj membroj baldaŭ iĝos veraj amikoj.

5.2. Establi **translimajn laŭtemajn stirgrupojn** por kune alfronti komunan problemaron, aŭ kunlabori por listigi, konservi aŭ videbligi specifan tipon de industria kaj teknika heredaĵo.

Ĉiu stirgrupo estas gvidata de asocio el unu lando, kaj apogata de almenaŭ du organizaĵoj el du aliaj landoj. La intenco estas ke tiuj stirgrupoj daŭrigu sian laboron post 2015 kaj, espereble, iam akcepteblos por ricevi apogon tra unu el la eŭropaj programoj.

Nun aktivas tri stirgrupoj, nome:

- *danĝera industria heredaĵo* (malpura aŭ kies funkciado ne konformas kun la leĝoj kaj reguloj pri sekureco kaj higieno ĉe laboro)
- *fabrikaj kamentuboj* kiel simboloj kaj markoj en la pejzaĝo
- konservado kaj renovigo de *havenaj grupoj*

Aliaj stirgrupoj estas preparataj. Unu tia rilatas al Eŭropa kampanjo en favoro de la konservado de vento-, akvo- kaj ĉevalo-muelejoj. (M3 = *Majo Muelilo Monato*, Mai Mois des Moulins, May Month of the Mills). Pri tiu post kelkaj monatoj sekvos komuno.

En ĉiuj landoj jam fervore laboras volontuloj pri "*2015 Kampanjo por Industria kaj Teknika Heredaĵo*". Ni alvokas ĉiujn por kunlabori kaj kontribui al la sukceso.

Ni petas vin ankaŭ disvastigi ĉi tiun kaj la sekvantajn mesaĝojn (revuoj, retejo, elektronika bulteno kaj/aŭ sociaj retoj)

Se vi aŭ via asocio havas ideojn, planas aktivecojn en 2015, aŭ deziras kunlaboron kun samideanoj el alia eŭropa lando, kontaktu la eŭropan kampanjo-sekretariejon:
E-FAITH, European Federation of Associations of Industrial en Technical Heritage
c/o Vredelaan 72, B-8500 Kortrijk, Belgio

2015@e-faith.org

aŭ tra la retpaĝoj:

- www.e-faith.org/home (vidu la dekstran kolumnon)
- www.industrialheritage2015.eu (nova retpaĝo nun konstruata)